



Tutmonda Biblioteko je la
memoro de L. Tolstoj.

..... № II

SIGNALO.

RAKONTO DE
VSEVOLOD GARŜIN.

*Tradukis el la rusa lingvo
N. Kabanov.*

La traduko estas korektita de la anoj de Esper. Literat.
Asocio: S-ino M. Blaise (Anglujo), S-ro H. Bonnevie (Nor-
vegujo), S-ro W. W. Padfield (Anglujo).

ELDONO № 1101 DE LA FIRMO
„POSREDNIK“ (PERANTO).

СИГНАЛЪ. Всеволода Гаршина.

ВЪ ПЕРЕВОДЪ НА ЭСПЕРАНТО.

Издание „ПОСРЕДНИКА“.

Moskvo. 1916.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.

POR KIO ESTAS ELDONATA „TUTMONDA BIBLIOTEKO JE
LA MEMORO DE L. TOLSTOJ“.

„Unu animo en ĉiuj“,—vere diras L. Tolstoj. Tial ĉefa tasko de homa vivo estas ĉiam pli granda frata unuiĝo de homoj, de gentoj kaj de popoloj kaj, plue, unuiĝo de ĉio vivanta sur la tero.

Nia eldona firmo „Posrednik“ (Peranto), kiu estas fondita de L. Tolstoj en 1885 jaro, kaj kiu nun estas esperantia entrepreno, starigis kiel sian taskon eldonadon de libroj, disvastigantaj ideojn de la frata unuiĝo de homoj kaj de ĉio vivanta en mondo. Pro tio, ke la internacia lingvo Esperanto estas kreita nome por tia celo de la unuiĝo de homoj de ĉiuj gentoj kaj popoloj, nia eldona firmo nun komencas eldonadon de libroj en lingvo Esperanto.

Plej alta, plej ĝojiga unuiĝo de homoj estas unuiĝo en komunaj sentoj de frateco, de amo, de heroa kaj modesta ĉiutaga sindonemo, de kompatemo rilate al ĉiuj vivaj estaĵoj, de frata kunhelpado kaj kunlaborado de homoj por komuna bono. Pro tio libroj de esperanta fako de nia eldona firmo estos celantaj ĉefe disvastigadon de tiuj ĉi sentoj, de tiuj ĉi ideoj.

Serio de niaj esperantaj eldonaĵoj estas nomata „Tutmonda Biblioteko“ kaj estas dediĉita al la memoro de nia amiko Lev Nikolàeviĉ Tolstoj, granda predikanto de la unuiĝo de ĉiuj vivoj en mondo.

Komencante tiun ĉi aferon, ni forte esperas subtenadon de ĉiuj, kunsentantaj al la afero. Tiu ĉi subtenado povas esprimiĝi en komunikadoj al ni de verkoj kaj de artikoloj, presitaj en iaj ajn lingvoj kaj plej konformantaj al la fundamentaj ideoj de „Tutmonda Biblioteko“, kaj en helpado de kiel eble plej vasta disvastigado de libretoj de „Tutmonda Biblioteko“ en ĉiuj landoj, kie estas uzata la lingvo Esperanto.

Amikoj en ĉiuj landoj! akceptu saluton de nia frata amo. Ni laboru amike kune por komuna sankta al ni celo.

Ĉefa redaktoro-eldonanto de firmo „Posrednik“

I. Gorbunov-Posadov.

Moskvo, Arbat, 36.

Tutmonda Biblioteko je la memoro
de L. Tolstoj.

№ 11.

SIGNALO.

RAKONTO DE

Vsevolod Garŝin.

*Tradukis el la rusa lingvo
N. Kabanov.*

La traduko estas korektita de la anoj de Esper. Literat. Asocio: S-ino M. Blaise (Anglujo), S-ro H. Bonnevie (Norvegujo), S-ro W. W. Padfield (Anglujo).

ELDONO DE LA FIRMO

„POSREDNIK“ (PERANTO).

№ 1101.

Moskvo, 1915.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata
de d-ro N. Kabanov.



Типо-литография Т-ва И. Н. КУШНЕРЕВЪ и К°. Пименовская ул., соб. д.
МОСКВА — 1915.

SIGNALO.

Simeono Ivanov estis fervoja gardisto. De lia budo ĝis unu stacidomo estis dekdu verstoj, ĝis alia stacidomo — dek verstoj. La pasintan jaron, kvar verstojn de la budo, oni konstruis grandan ŝpinfabrikon; ĝia alta forna tubo nigris post arbaro, kaj estis nenia loĝejo pli proksime, krom la najbaraj fervojaj budoj.

Simeono Ivanov estis malsana homo. Antaŭ naŭ jaroj li partoprenis militon; li estis serva soldato ĉe unu oficiro kaj faris kun li tutan militiron. Li malsatadis, frostiĝadis, varmegiĝadis sub sunradioj, faradis transirojn je kvardek — kvindek verstoj dum varmego kaj dum frosto; li ofte estis sub kugla pafado, sed, dank' al Dio, nenia kuglo trafis lin. Unu fojon la regimento staris en unua linio; tutan semajnon estis interpafado kun turkoj: nia ĉeno de la soldatoj kuŝis, kaj trans la valet — turka ĉeno, kaj de mateno ĝis vespero oni interpafis. La oficiro de Simeono ankaŭ estis en la ĉeno; ĉiun tagon trifoje Simeono portis al li varmegan samovaron kaj tagmanĝon el regimentaj kuirejoj, el kavego. Li iras kun la samovaro sur senarba ebenaĵo; kugloj fajfas, ekbatiĝas je ŝtonoj; terure estas al

Simeono, li ploras, sed iras. Sinjoroj oficiroj estis tre kontentaj je li: ĉiam ili havis varmegan teon. Li revenis senvunda el la militiro, nur la manoj kaj la piedoj komencis dolori. De tiu tempo li suferis nemalmulton da ĉagrenoj. Li revenis hejmen—lia patro mortis; lia trijara filĵo ankaŭ mortis, malsaniĝinte je la gorgo; kaj Simeono restis duope kun la edzino. Aferoj ne prosperis al ili, ja malfacile estis plugi la teron kun la ŝvelintaj manoj kaj piedoj. Fariĝis al ili netolereble en ilia vilaĝo, ili ekiris novajn lokojn por serĉi la feliĉon. Simeono kun la edzino vizitis multajn lokojn, nenie ili akiris feliĉon. La edzino dungigis kiel servistino, kaj Simeono ĉiam vagas, kiel antaŭe. Foje okazis al li veturi sur fervojo; kaj li vidas en iu stacidomo, ke la staciestro estas kvazaŭ konata. Simeono rigardas lin, kaj la staciestro ankaŭ enrigardas vizaĝon de Simeono. Rekonis ili unu la alian: la staciestro montriĝis la oficiro de lia regimento.

— Vi, Ivanov?—li diras.

— Ĝuste tiel, via moŝto, mi estas la sama.

— Kia okazo alkondukis vin ĉi tien?

Simeono rakontis al li ĉion.

— Nu kien vi iras nun?

— Mi ne povas scii, via moŝto.

— Kiel vi ne povas scii, malsaĝulo?

— Ĝuste tiel, via moŝto, ĉar mi havas nenian laboron. Mi devas, via moŝto, serĉi laboron.

La staciestro ekrigardis lin, meditis kaj diras:

— Nu jen, frato. Restu vi iun tempon en la stacidomo. Ŝajnas, ke vi havas edzinon. Kie estas la edzino?

— Ĝuste tiel, via moŝto, mi havas edzinon; la edzino servas en la urbo Kursko ĉe unu komercisto.

— Nu, skribu al la edzino, ke ŝi alveturu. Mi elklopodos por vi senpagan fervojan bileton. Fervoja budo liberiĝos baldaŭ ĉe ni; mi petos la distancestron pri vi.

— Mi tre dankas vin, via moŝto,—respondis Simeono.

Li restis en la stacidomo. Li helpis en la kuirejo de la staciestro, hakis hejtlignojn, balais la korton, la peronon. Post du semajnoj la edzino alveturis, kaj Simeono ekiris sian budon. La budo estis nova, varma; hejtlignoj—kiom vi volas; la malgranda legomĝardeno restis post antaŭaj gardistoj, kaj iom da plugebla tero estis ambaŭflanke de la fervojo. Simeono ekĝojis: li komencis pensi, kiel li aranĝos sian posedaĵon, aĉetos bovinon, ĉevalon.

Oni donis al li la tutan necesan ilaron: verdan flagon, ruĝan flagon, lanternojn, korneton, martelon, ŝraŭbilon por ŝraŭbingoj, ferrompilon, ŝovelilon, balailon, boltojn; oni donis du libretojn kun regularo kaj la hortabelon de vagonaroj. Unuan tempon Simeono ne dormis la noktojn, li ĉiam studis la hortabelon: ankoraŭ du horoj restas ĝis pasado de vagonaro, sed li ĉirkaŭiras sian parton de fervojo, sidiĝas sur la benketon apud la budo kaj ĉiam rigardas kaj aŭskultas, ĉu ne tremas la reloj, ĉu ne bruas la vagonaro. Li elstudis la regularon parkere; kvankam li legis malbone, tamen li elstudis.

La afero estis somere; la laboro ne estas malfacila, ne estas necese deŝoveli neĝon de reloj. Ankaŭ la vagonaroj estas maloftaj sur tiu ĉi fervojo; Simeono ĉirkaŭiras sian verston dufoje dum tago, provas ie la ŝraŭbingojn, ebenigas

la makadamon, esploras la akvotubojn kaj poste iras hejmen por aranĝi la mastrumaĵon. Nur unu malhelpo estis en lia mastrumado: kion ajn li intencas fari, pri ĉio li devas peti la fervojan majstron, kaj tiu devas raporti pri la peto al la distancestro; kiam la peto revenis, la tempo jam pasis. Simeono kun la edzino eĉ ekenuis.

Du monatoj pasis; Simeono komencis konatiĝi kun la najbaraj gardistoj. Unu estis kaduka maljunulo; oni ĉiam intencis anstataŭigi lin; li eliradis el la budo kun granda malfacileco. Lia edzino ĉirkaŭiradis la relvojon anstataŭ li. La alia gardisto, kiu loĝis pli proksime al la stacidomo, estis juna homo, malgrasa kaj muskoleca laŭ eksteraĵo. Li renkontiĝis kun Simeono unuan fojon sur la relvojo, en mezo inter budoj, dum ĉirkaŭirado; Simeono demetis la ĉapon, salutis.

— Bonan sanon, najbaro! li diras.

La najbaro ekrigardis lin de flanko.

— Bonan tagon! li diras.

Li sin turnis kaj ekiris for. La virinoj poste renkontiĝis. Ireo, la edzino de Simeono, salutis la najbarinon; tiu ĉi ankaŭ ne ekparolis, foriris. Unu fojon Simeono ekvidis ŝin.

— Pro kio, junulino, via edzo, li diras, estas neparolema?

La virino iom silentis, poste parolas:

— Nu pri kio li interparolos kun vi? Ĉiu interesiĝas pri sia... Iru kun Dio.

Tamen, kiam pasis ankoraŭ unu monato, ili interkonatiĝis. Kunvenas Simeono kaj Bazilo sur la relvojo, siĝas sur la randon, fumas pipojn kaj rakontadas unu

al la alia pri sia vivado. Bazilo pli ofte silentis, kaj Simeono rakontadis pri sia vilaĝo, pri la militiro.

— Dum mia vivo ne malmulte da ĉagrenoj okazis al mi, kvankam mia aĝo estas ankoraŭ negranda. Dio ne donis al mi feliĉon. Kian sorton Dio donas al iu, tia jam ĝi estas. Jen, frato, Bazilo Stepànoviĉ.

Kaj Bazilo Stepànoviĉ elbatis la restaĵon de tabako el la pipo je relo, sin levis kaj diras:

— Ne la sorto malfeliĉigas nin, sed la homoj. Ne ekzistas en mondo besto pli raba kaj malbona, ol la homo. Lupo ne manĝas lupon, sed homo manĝas homon.

— Nu, frato, lupo manĝas lupon, kontraŭ tio vi ne parolu.

— Nu, venis vorto sur la langon, jen mi diris. Tamen, ne estas besto pli kruela ol la homo. Se ne ekzistus homa kolereco kaj avideco, estus eble vivi. Ĉiu peras ekkapti vin je plej dolora loko, deŝiri pecon kaj manĝegi.

Simeono enpensiĝis.

— Mi ne scias, frato,—li diras. Eble estas tiel; sed se estas tiel, sekve, estas tiel difinite de Dio.

— Nu, se estas tiel,—diras Bazilo, ne estas necese al ni eĉ interparoli. Se oni opinias ĉian malbonaĵon difinita de Dio, kaj mem oni sidas kaj toleras, tio, frato, signifas esti ne homo, sed bruto. Jen mia diro al vi.

Li sin turnis kaj ekiris ne adiaŭinte. Simeono ankaŭ sin levis.

— Najbaro,—li krias,—pro kio vi insultas?

La najbaro ne returnis sin, ekiris. Simeono longe rigardis lin, ĝis kiam Bazilo fariĝis jam ne vidata. Li revenis hejmen kaj diras al la edzino:

— Nu, Ireno, kia estas nia najbaro! veneno, ne homo!
Tamen ili ne malpaciĝis; ili renkontiĝis denove kaj kiel antaŭe komencis interparoli, kaj ĉiam pri la sama.

— He frato, se ne homoj... ni ne vivus en tiuj ĉi budoj,—diras Bazilo.

— Nu ja, en la budo ankaŭ estas eble vivi.

— Estas eble vivi, estas eble vivi... He, vi! multe vivis, malmulte akiris, multe rigardis, malmulte vidis. Por malriĉa homo, en budo aŭ ie, kia estas vivado! Kiom da salajro vi ricevas?

— Nu, nemulte, Bazilo Stepànoviĉ,—dekdu rublojn.

— Kaj mi—dektri kun duono. Sed permesu demandi vin, pro kio tiom? Laŭ la regularo al ĉiu el ni estas difinite de l'administrantaro: dekkvin rubloj ĉiumonate, hejtado, lumigado. Kaj kiu difinis al ni dekdu rublojn aŭ dektri kun duono, permesu demandi vin? Kaj vi diras—estas eble vivi! Vi komprenu, la parolo estas ne pri unu rublo kaj duono aŭ tri rubloj. Eĉ se ili pagus dekkvin. Pasintan monaton mi estis en la stacidomo; la direktoro traveturis; kaj mi vidis lin. Mi havis tian honoron. Li veturas en aparta vagono; li eliris la peronon, staras. Ne, mi ne restos tie ĉi longe; mi foriros, kien ajn.

— Kien vi foriros, Stepànoviĉ? De bono oni ne serĉas bonon. Tie ĉi vi havas loĝejon, varmon, iomete da plugtero. Via edzino estas laborulino...

— Plugtero! Se vi rigardus mian plugteron. Nenio estas sur ĝi. Printempe mi plantis brasikon; sed la fervoja majstro alveturis: „Kio estas ĉi tio? li diras: pro kio vi plantis sen raporto? pro kio sen permeso? Elfosù, ke ĝi

tute ne estu“. Li estis malsobra. Alian fojon li dirus nenion, sed tiam... venis en kapon... „Monpuno je tri rubloj!“

Bazilo iom silentis, ekfumis kaj diras mallaŭte:

— Se estus ankoraŭ io plu, mi batus lin ĝis morto.

— Nu, najbaro, vi estas flama kapo, mi diros al vi.

— Mi ne estas flama kapo, sed mi diras kaj meditas laŭ vero. Nu, li ricevos de mi, la ruĝa vizaĝaĉo. Mi plendos al la distancestro mem.

Kaj vere li plendis.

Unu fojon la distancestro veturis por inspekti la fervojon. Tri tagojn poste gravaj sinjoroj devis traveturi,—ili reviziis,—pro tio antaŭ ilia traveturado estis necese ĉion ordigi. Oni alŝutis balaston, ebenigis, trarigardis la relojn, plifirmigis la ŝraŭbingojn, kolorigis la telegrafajn kolonojn, surŝutis flavan sablon sur la transrelajn veturejojn. La najbara gardistino eĉ elirigis sian maljunulon por forskrapi herbon. Simeono laboris la tutan semajnon; li ordigis ĉion, riparis sian kaftanon, purigis ĝin kaj frotis sian kupran ŝildeton per briko ĝis brilado. Bazilo ankaŭ laboris. La distancestro alveturis sur „drezino“: kvar laboristoj turnas tenilon; dentradetoj bruas; la drezino veturegas po dudek verstoj ĉiuhore. La estro alveturis al Simeona budo; Simeono alkuris, raportis soldatmaniere. Ĉio montriĝis en ordo.

— Ĉu delonge vi estas tie ĉi? demandas la estro.

— De la dua de majo, via moŝto.

— Bone. Dankon. Kaj en centsesdekkvara numero kiu estas?

La fervoja majstro (li veturis kun la estro sur la drezino) respondis:

— Bazilo Spiridov.

— Spiridov, Spiridov... ha! estas tiu sama, kiu pasintan jaron estis notita pro malbona konduto?

— La sama.

— Nu, bone, ni rigardu Bazilon Spiridov. Ekveturu! La laboristoj ekturis la tenilon; la drezino ekveturis.

Simeono rigardas ĝin kaj pensas: „Nu, granda malagrablaĵo estos al la najbaro“.

Post du horoj li eliris por ĉirkaŭirado. Li vidas, ke iu iras el la kavego laŭ la relvojo, kaj kvazaŭ io blanka vidiĝas sur la kapo. Simeono komencis enrigardi. — Bazilo: en la mano estas bastono, post la ŝultroj estas malgranda saketo, la vango estas bandaĝita per tuko.

— Najbaro, kien vi iras? krias Simeono.

Bazilo aliris tute proksime; la mieno estas konfuzegita; la vizaĝo estas blanka, kiel kreto; la okuloj estas sovaĝaj; li komencas paroli—la voĉo interrompiĝas.

— En urbon,—li diras,—en Moskvon... en la administrejon.

— En la administrejon... jen kio! Sekve, vi iras por plendi? Ĉesu, Bazilo Stepànoviĉ, forgesu...

— Ne, frato, mi ne forgesos. Jam estas malfrue por forgesi. Vi vidas, ke li ekbatis min je vizaĝo, ekbatis ĝis sangofluo. Dum mi vivos, mi ne forgesos.

Simeono prenis lin je la mano.

— Ĉesu, Stepànoviĉ; vere mi diras al vi: ne estos pli bone.

— Pli bone! Mi scias mem, ke ne estos pli bone; vi diris veron pri la sorto. Mi ne faros pli bonan por mi, sed necese estas, frato, defendi la veron.

— Diru, pro kio tio-ĉi fariĝis.

— Pro kio... Li rigardis ĉion,—malsupreniĝis de la drezino, enrigardis en la budon. Mi ja sciis, ke li estos severa, kaj mi ordigis ĉion bone. Li jam intencis forveturi, kaj mi ekplendis. Li tuj ekkriis: „Tie ĉi,—li diras,—la registara revizio, kaj vi plendas pri la legomĝardeno! Tie ĉi,—li diras,—la gravaj oficistoj, kaj vi rakontadas pri brasiko!“ Mi ne toleris, diris vorton; kaj ĝi montriĝis al li ofenda. Li vangofrapis min... mi staras, kvazaŭ tiel necese estas. Ili forveturis, mi rekonsciiĝis, viŝis mian vizaĝon kaj ekiris.

— Nu kiu prizorgos la relvojon?

— La edzino restas. Ŝi plenumos ĉion. He, diablo ilin prenu, kun ilia fervojo.

Bazilo sin levis, pretiĝis por ekiri.

— Adiaŭ, Ivànoviĉ! Mi ne scias, ĉu mi trovos la veron.

— Ĉu efektive vi ekiros piedire?

— En stacidomo mi petos permeson veturi en komercaĵa vagonaro; morgaŭ mi estos en Moskvo.

La najbaroj adiaŭis, Bazilo ekiris, kaj longe li forestis. La edzino laboris anstataŭ li, ne dormis tagojn kaj noktojn, tute konsumiĝis, atendante la edzon. Trian tagon la revizio alveturis: lokomotivo, pakaja vagono, kaj du unuaklasaj vagonoj, sed Bazilo ĉiam forestas. Kvaran tagon Simeono ekvidis lian edzinon: la vizaĝo ŝvelinta pro larmoj, okuloj estas ruĝaj.

— Ĉu la edzo revenis?—li demandas.

La virino eksvingis la manon, diris nenion kaj ekiris al sia budo.

Simeono instruiĝis iam, estante ankoraŭ knabo, fari fajfilojn el saliko. Li elbruligas la internaĵon en salika bastoneto, boras truetojn, kie necese estas; kaj tiel bone li aranĝas, ke oni povas ludi, kion oni deziras. Li faradis en libera tempo multajn fajfilojn kaj sendadis ilin kun konata konduktoro urban bazaron; oni pagis al li tie po tri kopekoj por unu peco. Trian tagon post la revizio li restigis hejme la edzinon, por ke ŝi renkontu la vesperan sesahoran vagonaron, kaj mem li prenis kun si tranĉilon kaj ekiris la arbaron por tranĉi al si bastonetojn. Li ĝisiris ĝis la fino de sia parto de la relvojo; en tiu-ĉi loko la relvojo tre flankeniĝis; li malsupreniĝis de la relvoja teramasajo kaj ekiris tra arbaro malsupren. Duonverston de tie-ĉi estis la granda marĉo kaj apud ĝi kreskis bonegaj salikaj arbetoj por liaj fajfiloj. Li eltranĉis tutan parton da bastonetoj kaj ekiris hejmen. Li iras tra la arbaro; la suno estis jam subiranta; profunda silento; nur estas aŭdate, kiel la birdoj ĉirpas, kaj la sekaj branĉoj kraketas sub la piedoj. Simeono pasis iom ankoraŭ; baldaŭ estos la relvojo; kaj ŝajnas al li, ke io ankoraŭ aŭdiĝas; kvazaŭ ie fero sonbatigas je fero. Simeono ekiris pli rapide. Ordigado ne estis tiun tempon en lia relvoja parto. „Kion ĝi signifas?“ li pensas. Li eliras la randon de la arbaro, — antaŭ li estas la relvoja teramasajo: supre, sur la relvojo, homo kaŭras, faras ion; Simeono komen-

cis sekrete supreniĝi al li: li opiniis, ke iu venis ŝteli ŝraŭbingojn. Li rigardas—homo sin levis; en liaj manoj estas rompilo; li subigis la rompilon sub la relon kaj ekmovis ĝin flanken. Mallumiĝis en la okuloj de Simeono; li volas ekkrii, sed ne povas. Li vidas Bazilon, kuregas supren, kaj tiu kun la rompilo kuregas de la teramasajo alian flankon.

— Bazilo Stepànoviĉ! karulo, revenu! Donu la rompilon, ni restarigu la relon, neniu scios. Revenu, savu de peko vian animon.

Bazilo ne returnis, ekiris la arbaron.

Simeono staras apud la deturnita relo; li faligis ĉiujn siajn bastonetojn. Vagonaro iras ne komercaĵa, sed pasaĝera. Kaj per nenio li povas haltigi ĝin: ne estas flago. Li ne povas restarigi la relon sen iloj, per malplenaj manoj. Necese estas kuri, nepre kuri la budon por ia ilo. Dio, helpu!

Simeono kuras al sia budo, spiras malfacilege. Li kuras, preskaŭ falas. Li elkuris el la arbaro, — ĝis la budo restis ne pli ol ducent metroj, — li aŭdas, ke fajfilego fajfegis en la fabriko: sesa horo. Kaj je du minutoj post sesa horo la vagonaro traĭros. Dio! savu senkulpajn animojn! Kaj Simeono kvazaŭ vidas antaŭ si: la lokomotivo ekbatiĝas per la maldekstra rado je la deturnita relo, ekstremas, kliniĝas, komencas rompegi la relojn, kaj ĉi tie estas flankeniĝo de la relvojo, la teramasajo; kaj la vagonoj falas malsupren je dudek metroj, kaj tie, en la triaklasaj vagonoj—multego da homoj, malgrandaj infanoj. Ili ĉiuj vidas nenion, pensas pri nenio. Dio,

prudentigu min... Ne, se mi ĝiskuros la budon, mi ne havos tempon por reveni...

Simeono ne ĝiskuris la budon, returnis sin kaj ekkuris pli rapide, ol antaŭe. Li kuras preskaŭ senkonscie; mem li ne scias, kio estos. Li ĝiskuris ĝis la deturnita relo: liaj bastonetoj kuŝas amase. Li kliniĝis, ekkaptis unu, mem li ne komprenas por kio: li ekkuris pluen. Ŝajnas al li, ke la vagonaro jam iras. Li aŭdas malproksiman fajfadon, aŭdas—la reloj ekstremetis egalmezure kaj senbrue. La fortoj malestas por kuri pluen: li haltis ducent metrojn antaŭ la terura loko: tiam kvazaŭ ia lumo lumigis lian kapon. Li demetis la ĉapon, elmetis el ĝi kotonan tukon; li elmetis tranĉilon el tibiingo, faris krucan signon. Dio benu! Li batis sin per tranĉilo je maldekstra brako super la kubuto, la sango ekŝprucis, ekfluis per varmega flueto; li trempis sian tukon je la sango, disetendis ĝin, alligis al la bastono kaj elstarigis sian ruĝan flagon.

Li staras, svingas sian flagon, kaj la vagonaro estas jam vidata. La maŝinisto ne vidas lin, alveturas proksimen, kaj sur la spaco de ducent metroj neeble estas haltigi la multepezan vagonaron!


Kaj la sango ĉiam fluas. Simeono alpremas sian vundon al sia korpo, volas ĉesigi la sangofluon, sed la sangofluo ne ĉesas. Ektorniĝis en lia kapo; en la okuloj ekflugis nigraj muŝoj; poste eĉ entute mallumiĝis en la okuloj; en la oreloj estas la sonoro. Li ne vidas la vagonaron kaj ne aŭdas la bruon; sola penso estas en la kapo: mi ne eltenos, falos, faligos la flagon; la vagonaro transveturos trans mi... Helpu, Dio, sendu anstataŭon...

Kaj fariĝis nigre en liaj okuloj kaj malplene en lia animo; kaj li faligis la flagon. Sed la sanga standardo ne falis teren: ies mano ekkaptis ĝin kaj alten levis renkonte al la proksimiĝanta vagonaro. La maŝinisto ekvidis ĝin, fermis la regulatoron... kaj la vagonaro haltis.

La homoj elsaltis el la vagonoj, kunamasiĝis. Kaj ili vidas: homo kuŝas tuta en sango, sen konscio; alia homo staras apud li kun la sanga ĉifono sur la bastono.

Bazilo rigardis ĉiun, mallevis la kapon.

-- Ligu min,—li diras:—mi deturnis la relon.



МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫКЪ.

Internacia lingvo.

ВЪ ИЗДАНИИ „ПОСРЕДНИКА“.

- 1) Н. Кабановъ. Вспомогательный международный языкъ эсперанто. Съ письмомъ Л. Н. Толстого объ языкъ эсперанто. Цѣна 12 коп.
N. Kabanov. Internacia helplingvo Esperanto. Kun letero de L. Tolstoj pri la lingvo Esperanto. Prezo 12 sd.
- 2) Н. Кабановъ. Первая эсперантская книга для чтенія съ грамматикой и словаремъ. Второе изданіе. Цѣна 25 коп.
N. Kabanov. Unua esperanta legolibro kun gramatiko kaj vortaro. Dua eldono. Prezo 25 sd.
- 3) Н. Кабановъ. Полная грамматика эсперантскаго языка. Съ примѣрами, упражненіями и съ переводомъ упражненій на русскій языкъ. Второе изданіе. Цѣна 45 коп.
N. Kabanov. Plena gramatiko de la lingvo esperanto. Kun ekzemploj, ekzercoj kaj kun rusa tradiko de la ekzercoj. Dua eldono. Prezo 45 sd.
- 4) Л. Л. Заменгофъ. Основы международного языка Эсперанто. Второе изданіе. Цѣна 35 коп.
L. L. Zamenhof. La fundamento de la internacia lingvo Esperanto. Dua eldono. Prezo 35 sd.
- 5) Н. Кабановъ. Самый легкій языкъ—Эсперанто. Самоучитель эсперантскаго языка для дѣтей, юношества и для всѣхъ, начинающихъ его изучать. Цѣна 35 коп.
N. Kabanov. La plej facila lingvo—Esperanto. Memlernolibro de la lingvo Esperanto por infanoj, gejunuloj kaj por ĉiuj komencantaj lerni ĝin. Prezo 35 sd.
- 6) Н. Кабановъ. Краткій русско-эсперантскій словарь. Цѣна 40 коп.
N. Kabanov. Rusa-esperanta vortaro. Prezo 40 sd.
- 7) Н. Кабановъ. Полный эсперантско-русскій словарь. Ц. 70 к.
N. Kabanov. Plena esperanta-rusa vortaro. Prezo 70 sd.

Продаются въ книжномъ магазинѣ „ПОСРЕДНИКЪ“ (Москва, Петровскія линіи) и въ другихъ книжныхъ магазинахъ. Выписывать можно изъ главн. склада изданій „ПОСРЕДНИКА“: Москва, Арбатъ, 36. И. И. ГОРБУНОВУ.

ВСЕМІРНА БИБЛІОТЕКА ВЪ ПАМЯТЬ Л. Н. ТОЛСТОГО.
TUTMONDA BIBLIOTEKO JE LA MEMORO DE L. TOLSTOJ.

- L. Tolstoj. Dio unu por ĉiuj (Surata kafejo) (Богъ одинъ у всѣхъ.)
Prezo 5 k. (5 sd.).
- ” Unu animo en ĉiuj (Одна душа во всѣхъ.) Prezo 10 k. (10 sd.).
- ” Unua ŝtupo, aŭ senmortiga nutrado. (Первая ступень.)
Prezo 25 k. (25 sd.).
- ” Dio vidas veron, sed ne baldaŭ diros. (Богъ правду видитъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
- ” Du maljunuloj. (Два старика.) Prezo 15 k. (15 sd.).
- ” Kie estas amo, tie estas Dio. (Гдѣ любовь, тамъ и Богъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
- ” Sieĝo de Sebastopolo. (Осада Севастополя.) Prezo 35 k.
(35 sd.).
- ” Kaŭkaza militkaptito. (Кавказскій плѣнникъ.) Prezo 20 k.
(20 sd.).
- ” Per kio homoj estas vivaj. (Чѣмъ люди живы.) Prezo 15 k.
(15 sd.).
- Naĵivin. Pri kio la steloj parolas. (О чемъ говорятъ звѣзды.) Prezo 15 k.
(15 sd.).
- Garŝin. Kvar tagojn sur kampo de batalo. (Четыре дня на полѣ сраженія.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
- ” Signalo. (Сигналъ.) Prezo 10 k. (10 sd.).
- ” Legendo pri fiero Ageo. (Сказаніе о гордомъ Аггеѣ.) Prezo
10 k. (10 sd.).
- Semjonov. Kortisto (kun autaŭparolo de L. Tolstoj.) (Дворникъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
- Lastaj kvin tradukoj estas korektitaj de la anoj de Esper.
Literat. Asocio.

Estas presataj:

- L. Tolstoj. KREDU al vi mem. (Вѣрьте себѣ.)
Amu unu alian. (Любите другъ друга.)
- L. Tolstoj. Unua, dua, tria, kvara kaj kvina libretoj por infanoj.
(1, 2, 3, 4 и 5 книжки для дѣтей.)
- V. Korolenko. La infanoj de la subteraĵo (Дѣти подземелья.)
- Aksakov. Skarlata floreto. (Аленькій цвѣточекъ.)
- Rusaj popolaj fabeloj. (Русскія народныя сказки.)

Libroj estas vendataj en la librovendejo „Posrednik“ (Moskvo, Petrovskaja linio) kaj en aliaj librovendejoj. Por mendoj sin turnin la ĉefan librotenejon de la eldonoj de „Posrednik“: Moskvo, Arbato, 36, al I. I. Gorbunov.

Выписывать изъ главнаго склада изданій „ПОСРЕДНИКА“: Москва, Арбатъ, 36. И. И. ГОРБУНОВУ.

Цѣна 10 коп.—Prezo 10 sd.

